

Pasporto

tra la

**Zamenhofaj Esperanto-Objektoj
en Kroatio**

Pasporto

tra la
Zamenhofaj Esperanto-Objektoj
en Kroatio

Ĉi tiu Pasporto apartenas al

Pasporto tra la Zamenhofaj Esperanto-Objektoj en Kroatio
1-a eldono, 2021

**Kontribue al la promocio de la
„Tradicio de Esperanto en Kroatio”,
kiu la 11-an de februaro 2019 estis
proklamita nemateria kultura havaĵo
de Kroatio n-ro Z-7298.**

Kompilis kaj verkis:
Josip Pleadin

Uzita materialo de:
Dokumenta Esperanto-Centro, Đurđevac

Eldonis:
Bjelovara Esperantista Societo
esperanto.bjelovar@gmail.com



**Libere elŝutebla kaj uzebla
nur por nekomercaj celoj.**

**Ĉiuj rajtoj rezervitaj
ĉe la eldonisto kaj kompilinto.**

Enkonduko

La fenomeno de ZEO-j (Zamenhofaj Esperanto-Objektoj) konatas jam delonge. En la libro *Monumente pri Esperanto*, por la unua fojo listigis ilin Hugo Röllinger. Sed en 2018 la franca esperantistino Isabelle Nicolas diskonigis la ideon pri ilia repopularigo, skribante ke „ZEO-j ekzistas jam delonge, sed ili estas nek sufiĉe konataj, nek uzataj por reklami Esperanton”. Ŝi proponis publikigi libretforman pasporton, subkribatan de turismaj oficejoj kaj urbaj aŭtoritatoj. Tiamaniere la vojaĝantoj havus interesajn memoraĵojn pri siaj vojaĝoj, kaj Esperanto estus pozitive traktata en neesperantistaj institucioj.

La ideon de Isabelle Nicolas almenaŭ parte klopodas realigi Bjelovara Esperantista Societo, eldonante ĉi tiun libreton, kies publikigon sponis la statusto de nemateria kultura havaĵo, kiun „la tradicio de Esperanto en Kroatio” akiris en 2019. Konservado de informoj pri la ekzistantaj ZEO-j en Kroatio kaj ilia inkludo en kutimajn turismajn (almenaŭ esperantistajn) itinerojn estas la ĉefa celo de nia *Pasporto*. La alia celo estas instigi esperantistojn al konstanta prizorgo de kelkfoje neglektitaj ZEO-j kaj starigo de novaj, kio finfine celas krei pozitivan publikan opinion pri Esperanto kaj ĝia movado. Tio estas tre bezonata, kaj certe temas pri unu el la ĉefaj taskoj de ĉiuj portantoj de Esperanto kiel nemateria kultura havaĵo en Kroatio.

Kutime esperantistoj ne havas precizajn informojn pri la graveco de lokoj kaj homoj al kiuj rilatas unuopaj ZEO-j. Nia libreto klopodos klarigi kiam, sub kiaj kondiĉoj, pro kiaj kaŭzoj kaj je kies iniciato ekestis iu el la nun ekzistantaj ZEO-j en Kroatio. Ĝi same celas aktualigi kaj laŭeble kompletigi la liston, kaj tiel rememorigi pri la neglektitaj kaj forgesitaj ZEO-j. Nun temas pri modesta kaj nur Esperantlingva eldono, kiu en postaj jaroj devus aperi pli ampleksa kaj pli alloga eĉ por nacilingva kaj neesperantista publiko.

Kvankam por la unua eldono ni ne povis ebligi oficialan stampadon aŭ alimanieran atestadon de via vizito al koncernaj ZEO-j, ni antaŭvidis la eblecon ke vi mem aŭ lokaj Esperanto-societoj faru konkretajn notojn pri tiaj vizitoj en ĉi tiu *Pasporto*.

Se vi verkos aŭ publikigos ion pri viaj vizitoj kaj kun tio ligitaj spertoj, bonvolu sedi al ni fotojn, artikolkopiojn aŭ retligilojn!

Agrablan vizitadon al niaj ZEO-j!

Por Bjelovara Esperantista Societo
Franjo Forjan, prezidanto

Bjelovar

45°55'N 16°50'E

1. Memortabulo al Vilim Polašek



*Vilim Polašek
(1910 - 1994)*

Fotis: Sanja Forjan Pleskina



Partoprenantoj post la solena starigo de la memortabulo.

Memortabulo al Vilim Polašek staras sur lia iama loĝdomo en la strato *Tome Bakača n-ro 2*, kun permeso de lia filino Zdenka Polašek kaj aliaj familianoj. Ĝian starigon en la jara laborplano por 2019 iniciatis Bjelovara Esperantista Societo, kiu per tio omaĝis la plej elstaran bjelovaran esperantiston. Vilim Polašek agadis por Esperanto dum pluraj jardekoj, kaj ĉefe pro liaj meritoj Esperanto havas fortan pozicion en Bjelovar kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La tradicio de Esperanto en Bjelovar daŭras pli ol 110 jarojn, ĉar la unua Esperanto-societo estis fondita en 1909.

Starigo de la memortabulo estis parto de la tradicia aranĝo *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*, kiu en 2019 okazis la 7-an fojon (inter la 20-a kaj 23-a de septembro) kaj estis plene dediĉita al la festado de la 110-jara jubileo de Esperanto en la urbo.

La solenaĵon, okazintan en la posttagmezaj horoj la 21-an de septembro, dum kiu estis malkovrita la memortabulo, partoprenis multaj esperantistoj kiuj kolektiĝis en la renkontiĝo. Pri Vilim Polašek dum la solenaĵo parolis Josip Pleadin, kaj la memortabulon malkovris kune Tea Macan, la filino de Vilim Polašek, kaj Martin Schäffer, direktoro de Universala Esperanto-Asocio.

La memortabulo estas farita el sablokolora marmoro sur kiu estas ĉizitaj nigrakoloraj literoj. La teksto, kiun formulis la estraro de Bjelovara Esperantista Societo, estas dulingva (kroata kaj Esperanta). La memortabulon produktis la ŝtonĉizista metiejo *Mirta* el Klokočevac apud Bjelovar, kaj la kostojn pagis Departemento Bjelovar-Bilogora, kompleze de la departementestro Damir Bajš.



Tea Macan kaj Martin Schäffer malkovras la tabulon.

Notoj

Bjelovar

45°55'N 16°50'E

2. Arbo de internacia amikeco



Franjo Forjan kaj Edvige Ackermann plantas la arbon.



La arbo estas markita per dulingva memorplato.

Fotis: Sanja Forjan Pleskina

La bjelovara *Arbo de internacia amikeco* estis plantita je la iniciato de Bjelovara Esperantista Societo dum la 20-a Alp-adria Esperanto-Konferenco, kiu okazis en Bjelovar inter la 8-a kaj 10-a de junio 2018, okaze de la 40-jara jubileo de Alp-adria Labor-komunumo.

Specio de la arbo estas ruĝfolia (japana) acero (lat. *Acer palmatum*). Havigis ĝin kaj faris preparlaborojn la laboristoj de *Florateliero Marina* (Marija kaj Ivan Šepoval) el Bjelovar.

La plantadon de la arbo permesis kaj la kostojn kovris Urbo Bjelovar, kompleze de la urbestro Dario Hrebak. Dum la plantado parolis Josip Pleadin, kaj nome de la esperantistoj, la arbon oficiale plantis Franjo Forjan kiel reprezentanto de bjelovaraj esperantistoj, kaj Edvige Ackermann el Triesto, kiel reprezentanto de alp-adriaj esperantistoj.

La plantadon partoprenis pluraj dekoj da bjelovaranoj kaj konferencanoj el Aŭstrio, Bosnio kaj Hercegovino, Hungario, Italio, Kroatio kaj Slovenio.

La arbo estas plantita en la parko, kiu portas la nomon de konata kroata politikisto Stjepan Radić (1871-1928), kiu dum la plenumo de la funkcio de ministro pri edukado, mem estis esperantisto kaj tre favora al enkonduko de Esperanto en ĉiujn komercajn lernejojn de tiama Jugoslavio. Liajn seriozajn planojn malebligis la atenco, okazinta en la beograda parlamentejo, post kiu li mortis.

La arbon oficiale prizorgas urbaj komunalaj instancoj.

Notoj

Đurđevac

46°02'N 17°04'E

1. Dokumenta Esperanto-Centro



*Josip Pleadin
(1958)*

Fotis: Ivan Pleadin kaj Sanja Forjan Pleskina



Inaŭguro de la Domo de Dokumenta Esperanto-Centro (2019).

Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) estas la nacia Esperanto-arkivo en Kroatio, iniciatita de kroata esperantisto Josip Pleadin, kiu kun kelkaj aliaj samideanoj la 13-an de junio 2010 fondis la samnoman societron, kaj en la periodo inter septembro 2017 kaj septembro 2019 konstruis la Domo de DEC en Đurđevac, en la strato Bana Jelačića 138.

La sidejo estis konstruita per monhelpo de eksterlandaj kaj kroataj esperantistoj, kaj la oficiala lanĉo de la domo okazis la 22-an de septembro 2019, kiam ĝin vizitis partoprenantoj de la aranĝo *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*.

Tiutage estis starigita provizora memortabulo al homoj kiuj finance ebligis la konstruigon de la domo de DEC. La memortabulon kune malkovris Josip Pleadin kaj Martin Schäffer, direktoro de Universala Esperanto-Asocio el Roterdamo.

La domo havas la spacon de ĉirkaŭ 80 kvadratmetroj en la teretaĝo kaj same tiom en la subtegmentejo.

La memortabulon, kiu havas la dimensiojn de 40 x 60 cm, produktis el plekiglaso kaj muntis la reklamstudio *Robi* el Koprivnica. Laŭplane, la provizoran tabulon en 2022 devus anstataŭi marmora tabulo kun iom ŝanĝita teksto.

DEC havas propran retejon: <https://novo.dec-kroatio.hr>



Josip Pleadin kaj Martin Schäffer malkovras la tabulon.

Notoj

Đurđevac

46°02'N 17°04'E

2. Epitafo



Fotis: Josip Pleadin



Detalo de la tomboŝtono kun epitafo.

La priskribata epitafo troviĝas sur la tombo de Ana Cenkoviĉan den. Marić (08. 03. 1912. Đurđevac - 24. 02. 1973. Novigrad Podravski), en la Urba tombejo de Đurđevac, kampo F, tombo n-ro 3. La Esperantan tekston *Patrino, la amo mia* sur la marmora tomboŝtono verŝajne aldonis unu el ŝiaj tri infanoj, la filino Ivka Cenkoviĉan el Novigrad Podravski, kun kiu ĉirkaŭ la jaro 1982 konatiĝis Josip Pleadin. Ne klaras la kialoj de tia ago, ĉar la nomoj nek de la patrino, nek de la filino troveblas en la listoj de kroataj esperantistoj aŭ Esperanto-kursanoj. La teksto supozeble estas aldonita en la jaro 1973 aŭ poste.



La urba tombejo de Đurđevac.

Notoj

Hraščina

46°06'N 13°12'E

1. Informtabulo pri meteorito de Hraščina



La unu informtabulo, starigita en 2009.

Fotis: Spomenka Štimec



La nuna informtabulo.

Fotis: Panda (visitzagorje.hr)

La informtabulo pri meteorito de Hraščina troviĝas en la vilaĝeto Kiternaši, apartenanta al la vilaĝo Domovec en la Komunumo Hraščina, sur malgranda senarbejo, atingebla se oni sekvas la vojmontrilojn el la centro de Trgovišće.

La trilingvan (kroata, angla, Esperanto) ilustritan tabulon starigis Komunumo Hraščina en majo 2009. Esperanto estis aldonita, ĉar la Komunumo Hraščina volis danki al esperantistoj, kiuj ofte kunvenis en la bieno Njeguš, posedata de esperantistino Spomenka Štimec. Ekde 1995 Kroata Esperanto-Ligo organizadis diversajn ĉiujarajn programojn, el kiuj la plej konataj estas *Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj* kaj *Meteorita festo*, tiu lasta dediĉita al la plej grava turisma atuto de Hraščina.

Sur la tabulo estas klarigita la fenomeno, kiu super la regiono de Zagorje okazis la 26-an de majo 1751, kiam ĝin trafis la granda meteorito. La plej granda parto de la meteorito, kiu pezas 39,76 kg, estas konservata en la Naturhistoria muzeo en Vieno (Naturhistorisches Museum Wien, Burgring 7) kiel ĝia unua kaj plej grava eksponaĵo, kaj la loko kie ĝi falis, estas signita kiel memorloko.

La ligna informtabulo, starigita en 2009, poste estis anstataŭita per alia, metala.



Meteorito de Hraščina

Notoj

Koprivnički Bregi

46°08'N 16°54'E

1. Memortabulo al Ilija Puhalo



Fotis: Siniša Milašinović

Ilija Puhalo
(1899 - 1937)



Partoprenantoj post la solena starigo de la memortabulo.

Koprivnički Bregi estas la vilaĝo situanta je 8 kilometroj de Koprivnica. En la Esperanta historio ĝi estas konata kiel lulilo de Esperanto en la regiono de Podravino. El tiu vilaĝo, la fervoja oficisto Ilija F. Puhalo, unu el la gvidantoj de Internacia Asocio de la Fervojistaj Esperantistoj (IAFE), disvastigis Esperanton en la tuta regiono. Per lia laboro fondiĝis Esperanto-societoj en Koprivnica, Đelekovec, Peteranec, Novigrad Podravski, Virje kaj aliloke.

La tabulon starigis Komunumo Koprivnički Bregi kaj iniciatis Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) el Đurđevac en 2012, okaze de la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj, kiun DEC organizis en Koprivnica inter la 22-a kaj 24-a de junio 2012, okaze de la 75-a mortodatreveno de Puhalo.

La ideo estis prezentita al Komunumo Koprivnički Bregi, kiu, dank' al la komunumestro Mario Hudić, donis permeson kaj financis starigon de la memortabulo. Ĝi estas lokita sur la iama Fajrobrigada domo (nuntempe Socia domo), en kiu iam funkciis Esperanto-klubo Bregi, fondita de Ilija Puhalo en julio 1924.

Esperanto-klubo Bregi estis tre progresema loka kulturasocio, kiu en la fajrobrigada domo funkciigis propran bibliotekon, kaj en aprilo 1925 eĉ instalis la unua radioaparaton en la vilaĝo.

La memortabulo havas dulingvan tekston (kroatan kaj Esperantan). Ĝi estas produktita el granito kaj havas orkolorajn literojn. La tabulon ĉizis ŝtonĉizista metiejo *Mramori i graniti Bos* (Nikola Bos) en Glogovac, kaj la 23-an de junio 2012 ĝin kune malkovris la estro de la Komunuma konsilio Darko Sobota nome de la Komunumo Koprivnički Bregi kaj Josip Pleadin nome de Dokumenta Esperanto-Centro.

Notoj

Kostrena

45°18'N 14°30'E

1. Skolta hostelo *Esperanto*



Foto: tzo-kostrena.hr



Malnova tabulo antaŭ la domo.



Vjekoslav Morankić

La Skolta hostelo *Esperanto* estas posedaĵo de Esperanto societo Rijeka. Tiun grandan domon en la urbeto Kostrena, situanta nur 7 kilometrojn de la urbocentro de Rijeka, la Esperanto societo Rijeka aĉetis en la 1980-aj jaroj per klopodoj de Vjekoslav Morankić kaj kelkaj aliaj societanoj.

Antaŭe ĝi estis konata sub la nomo *Vilao Amfora*, sed poste oni ŝanĝis ĝian nomon al *Esperanto-domo*.

En la Vilao, kaj poste en la Esperanto-domo funkciis diversaj aktivecoj por esperantistoj kaj neesperantistoj, inkluzive de Scikonkursoj pri Esperanto por lernantoj.

Ĉar esperantistoj ne povis uzi ĝin plentempe, la Esperanto societo Rijeka ludonis ĝin por uzo al Unuiĝo de skoltoj de Rijeka, kiu en ĝi aranĝis Skoltan hostelon, reteninte la nomon *Esperanto*. La kontrakto estis subskribita la 4-an de aprilo 2012 por periodo de 20 jaroj. Nome de la Societo la kontrakton subskribis Vjekoslav Morankić kaj nome de la Unuiĝo de skoltoj Dario Hren.

Notoj


Križevci

46°01'N 16°32'E

1. Epitafo



Fotis: Josip Pleadin, 2009



La Urba tombejo de Križevci

La epitafo troviĝas sur la tombo de familio Ljubić, en kiu estas entombigitaj Rudolf Ljubić (nask. en 1904) kaj lia edzino Marija (naskita en 1917). La Esperantlingva teksto (*Viva verda kaj ruĝa stelo, amo kaj paco nun regas sur la tero*) estas ĉizita sur aldona tabulo el blanka marmora, kiu estas muntita super la ĉefa tombotabulo. La vorto *Viva* estas malĝuste ĉizita anstataŭ *Vivu*.

Maldekstre de la teksto troviĝas verda kvinpinta Esperanta stelo, kaj dekstre la ruĝa kvinpinta stelo. La simboliko de la steloj certigas nin pri la politika ideologio de la forpasinto kaj pri lia esperantisteco.

La tombon hazarde trovis Josip Pleadin en la jaro 2009.

El la historio de Esperanto en Kroatio ni scias, ke Rudolf Ljubić estis esperantisto, komence en Zagrebo, kiu la finon de sia vivo pasigis en la ne plu ekzistanta loĝejo en la urbocentro de Križevci. Samjare, kiam estis trovita la tombon, Pleadin vizitis ankaŭ lian loĝejon. La loĝejo estis ŝlosita, sed kun klaraj signoj ke tie iam loĝis esperantisto.

El aliaj dokumentoj ni scias, ke la maljuna Ljubić estis membro ankaŭ de la Esperanto-klubo *Estanteco* en Križevci en la 1980-aj jaroj, sed aliaj informoj mankas.

La tombo troviĝas en la Urba tombejo de Križevci sur la parcelo XII, tombonumero 11-12.

Notoj

Lopud

42°41'N 17°56'E

1. Vilao Vesna



Fotis: *Divo Pulitika*, 2009



Ante Ramljak

Barilo kaj speciala tabulo de la Vilao Vesna, instalitaj de Ante Ramljak.

La Vilao *Vesna*, kiu troviĝas en la insulo Lopud apud Dubrovnik, sian nomon ricevis laŭ la slava diino de printempo. Projektis ĝin en 1938 la konata jugoslavia domprojektisto Nikola Dobrović (1897-1967) por la familio de Ivo Barić. Ĝi estis konstruita el ferumita betono en 1939, kaj por tiu epoko ĝi estis vere avangarda konstruaĵo.

En la 1960-aj jaroj la vilaon ekposedis advokato Ante Ramljak (1893- 1972), kiu ekde 1950 estis ankaŭ esperantisto. Ekde 1958 li reklamadis feriadon en la Vilao Vesna pere de la Jarlibro de UEA.

La barilon kiu ĉirkaŭas la parkon antaŭ la vilao, apud ĝia ĉefa vojo, konstruigis Ante Ramljak en 1968, nomante ĝin *Muro kontraŭ muroj*. Ĝi konsistas el 30 metrojn longa kaj 2 metrojn alta muro, en kies mezo troviĝas duonmetron profunda kaj 3,5 metrojn longa niĉo. Maldekstre kaj dekstre de la niĉo staras po 14 ŝtonaj literoj ĉiuflanke, kiuj kreas Esperantlingvan tekston: *Unu homara sorto - unu homarlingvo*.

La niĉo estas dividita je 7 duonmetraj partoj, 3 kolonoj kaj 4 interkolonaj spacoj, en kiuj estas sloganoj de supre malsupren en lingvoj kroata kaj Esperanto.

Ĉe la piedo de la meza kolono staras ŝtona tabulo, sur kiu estas kelklinie ĉizita jena teksto: *Unuiĝos la homaro, per preciza kalendaro, k. precize distingante, Esperanton parolante, kalkulante per rezono, unu mondo unu mono, 1968. - 1,234.567,89 dinaroj = 98,765,43 dolaroj*.

Sur la pinto de la meza kolono troviĝas teksto por la eterna mondkalendaro kun 13 monatoj.

Pri tiu temo aperis teksto de A. Ramljak mem en la libreto *La paperoj de d-ro Ante Ramljak* (IKS, Zagrebo, 1973). En la sama libreto estas priskribita ankoraŭ unu ZEO: la tombo de lia edzino Milunka Ramljak, kiu troviĝis en la loka tombejo en Lopud. La nunan ekziston de tiu ZEO ĝis nun neniu sukcesis konfirmi.

Notoj

Opatija

45°20'N 14°19'E

1. Memortabulo al Marija Pilepić



Fotis: Boris Di Costanzo




*Marija Pilepić
(1871 - 1962)*

Marija Pilepić (1871-1962) estis la unua kroata esperantistino, menciita en la Zamenhofa adresaro en 1889. Ŝi vivis en Osijek, kaj detalajn esplorojn pri ŝi faris Davor Klobučar (1961-2020). Siajn eksciojn li publikigis en la kroatlingva libro *Pet latica iz Osijeka* (2009). Dum tiuj esploroj estis trovite, ke la tombo de Marija Pilepić troviĝas en la Urba tombejo de Opatija, kaj Esperanto societo Rijeka klopodis protekti ĝin kiel valoran monumenton.

La 17-an de marto 2008 la urbestro de Opatija akceptis la proponon de esperantistoj, kaj transdonis al Esperanto societo Rijeka por nedefinita periodo la rajton uzi la tombon de Marija Pilepić, kiu troviĝas en la tombejo de Opatija, parcelo G, vico V, tombonumero 7.

En la jaro 2009 la societo starigis ankaŭ specialan dulingvan marmoran memortabulon sur la menciita tombo.

**Komunalac d.o.o. Opatija**
R.J. «USLUGA»
Suzbilo Lipovica 2
51460 OPATIJA
Tel. 271 113 701 200
Fak. 271 113 701 245
Klasa 023-01/05-11/06
Ur. Br. 2156/01-02-08-136
Opatija, 10.07.2008.

Na temelju članka 13. st. 1. Zakona o grobljima (Narodne novine br. 19/98) Uprava Komunalca d.o.o. Opatija po zaključku Gradskog Poglavarstva klasa: 023-01/05-01/06, ur. broj 2156/01-02-08-136 od 17.03.2008. donosi sljedeće

RJEŠENJE br. 32/08

1. GRADU OPATIJU Upravni odjel za komunalni sustav, OPATIJA M. Tita 3 (u daljnjem tekstu: Korisnik) daje se na korištenje grobno mjesto: JEDNOSTRUKO na groblju OPATIJA, poje G, red V, broj 7. Grobno mjesto daje se na korištenje na neodređeno vrijeme.
2. Za grobno mjesto iz članka 1. Rješenja korisnik nije platio naknadu već mu je isto dodijeljeno temeljem Zaključka Gradskog Poglavarstva klasa: 023-01/05-01/06 i ur. broj 2156/01-02-08-136 od 17.03.2008.
3. Komunalac d.o.o. Opatija upisao je korisnika u grobni očevidnik groblja OPATIJA.
4. Godišnju naknadu (grobnu pristojbu) za održavanje i uređenje groblja u roku određenom na uplatnici prema Zaključku Gradskog Poglavarstva plaćat će «Esperanto društvo Rijeka», Rijeka, Blaža Polica 2.

Obrazloženje

Gradsko Poglavarstvo Grada Opatije na svojoj 136. sjednici dana 11.03.2008. godine donijelo je Zaključak prema kojem se grobno mjesto gdje je ukopana pok. Marija Pilepić proglašava «grobim mjestom osobe značajne za Grad Opatiju», a sve temeljem članka 13. stavka 3. Odluke o upravljanju grobljima. Troškove održavanja groba nakon što uđe u registar objekata snosit će Esperanto društvo Rijeka, Rijeka, Blaža Polica 2.

*Dokumento de
la urbestro de
Opatija pri
la tombo de
Marija Pilepić*

Notoj

Osijek

45°33'N 18°41'E

1. Esperanto-strato



Partoprenantoj post la solena proklamo de Esperanto-strato.




Stratŝildo

Fotis: Josip Pleadin

La osijeka esperantisto Davor Klobučar (1961-2020) havis grandan intereson pri la historio de Esperanto. Li detale pristudis la unuan kvinopon de esperantistoj el Osijek, menciitan en la Zamenhofa adresaro el 1889 kaj konstatis, ke ili loĝis en la urboparto nomata Donji grad (Malsupra urbo).

En 2009, anstataŭ organizi kongreson de enlandaj esperantistoj, estis decidite per aparta aranĝo nomata *120 jaroj de Esperanto en Osijek kaj Kroatio* festi la 120-an datrevenon de la osijeka esperantista kvinopo.

Por tiu okazo, nome de la osijeka Esperanto-societo *Liberiga Stelo*, Davor Klobučar proponis al la urbestro de Osijek, ke oni donu la nomon de Esperanto al iu strato en la Malsupra urbo, proksime al la loko kie iam loĝis la esperantista kvinopo. La 22-an de decembro 2008 la Urba konsilantaro de Osijek akceptis tiun proponon kaj proklamis *Esperanto-straton*. La stratŝildo estis muntita la 9-an de oktobro 2009 kaj la solena malkovro, kun partopreno de multaj kroataj kaj alilandaj esperantistoj, okazis la 17-an de oktobro 2009.



Situo de Esperanto-strato



Davor Klobučar

Notoj


Primošten

43°35'N 15°56'E

1. Ŝtono de amikeco



*Gabrijel Divjanović
(1913-1991)*



INTERNACIA ESPERANTO
KAMPADEJO
PRIMOŠTEN



*La muelŝtono donacita de
francaj esperantistoj*

Ekde la 1-a de julio 1961 per klopodoj de esperantistoj-astronomoj el la Zagreba Observatorio kaj ilia gvidanto Gabrijel Divjanović (1913-1991), en ĝis tiam malriĉa fiŝista vilaĝo Primošten ĉe la adriatika marbordo, ekfunkciis Esperanto-kampadejo, kiu dum sia funkciado ĝis la malfruaj 1980-aj jaroj ŝanĝis kelkajn nomojn kaj akiris grandan famon en Esperantujo.

Post la furora sukceso de la libro *Tragedio en la universo*, verkita kaj eldonita de junaj astronomoj, en la kampadejo de Primošten feris ankaŭ francaj esperantistoj, kiuj proponis ĝemeliĝon inter Primošteno kaj la franca urbo Vallon Pont d'Arc en Provenco. En tiu tempo de armila vetkurado temis pri nekutima gesto, kiu tamen efektiviĝis en 1964, kiam apud la ĉefa alirvojo al la kampadejo, en la norda vojparto, estis starigita la *Ŝtono de amikeco*, kiu efektive estis malnova mueleja ŝtono donacita de la francoj, sur kiu la astronomoj ĉizis la nomon *Aleo Vallon Pont d'Arc*. La starigon gvidis Gabrijel Divjanović, kaj la laboron realigis membroj de internacia laborbrigado *International Voluntary Service*, kiuj en Primošteno helpadis dum instalado de akvoduktoj kaj elektro, dum plibeligo de la ĉirkaŭaĵo, konstruado de vojoj ktp. La memorŝtono estis duone enterigita, kaj per sia arko ĝi similis la naturan fenomenon kaj ŝtonan arkon super la riverkanjono, laŭ kio la franca urbo ricevis sian nomon Pro la posta konstruado de parkejo, la ŝtono estas translokitigita, kaj nun ĝi troviĝas maldekstre de la enirejo en la centran primoŝtenan hotelkomplekson *Zora* kaj *Slava*, sed ĝi estas apenaŭ rimarkebla, kaj la preterpasantoj ne komprenas la simbolajn vortojn sur ĝi ĉizitajn.


Honore al la ĝemeliĝo, en la franca ĝemelurbo Vallon Pont d'Arc, la ĉefplaco estis nomita *La Primoštena*, kaj la ĝemelurbaj rilatoj inter la du urboj daŭras ĝis nun.

Notoj

Rijeka

45°20'N 14°26'E

1. Memortabulo al Adriatika Ligo Eperantista



La dulingva memortabulo staranta en la ĉefstrato de Rijeka.

Fotis: Josip Pleadin, 2007

La unua Esperanto-organizaĵo fondita sur la teritorio de nuna Kroatio estis *Adriatika Ligo Esperantista (ALE)*, fondita la 28-an de septembro 1907 en Rijeka. Fondis ĝin la hungara barono Lajos d'Orczy, kaj ĝi havis 37 membrojn. Ĝian historion detale pristudis la ĵurnalisto de *Novi list* kaj esperantisto Radoslav Škalamera el Rijeka.

Sekve de tiu fakto, la 17-an de novembro 2007, Esperanto societo Rijeka organizis omaĝaranĝon okaze de la 100-a datreveno de la fondiĝo de ALE.

La memortabulo starigita tiuokaze, estis malkovrita la 17-an de novembro 2007 sur la domo en Korzo 18, kie iam funkciis la sidejo de ALE. La tabulon malkovris Boris Di Costanzo, tiama prezidanto de Esperanto societo Rijeka.



Adriatika Esperantistoj.

1. Bno L. d'Orczy, Suak, Villa Rustica 1.
2. Egldo Mihich, Fiume, Piase-Stranga 77.
3. Ebrando Springbet, Fiume, Corso 18. III.
4. Nask Riccardo, Fiume, Via Operai 4.
5. Gild Rudolfo, Fiume, Via della Riva 2. I.
6. Scholz Adolfo, Suak, Kacidero iteliste 3.
7. Sablumer de Antonio, Fiume, Via della Fila 4.
8. Petreus Carlo, Fiume, Banca di credito.
9. Langendorf de Gulio, Fiume, Casa Zmadi, Piazza Elisabetta.
10. Schulliger Rodolfo, Fiume, Danubius.
11. Subravici P. cappellaio, Fiume, Corso.
12. Popel Giovanni, Fiume, cap. marit. Ungaro-Croata.
13. Centis Enrico prof., Fiume, Via Clotilde haverala 1.
14. Fischele Vincenzo, omere, Fiume, Corso, Calle Grande.
15. Gili Bosina, Fiume, Via della Riva 2. I.
16. Vallencich Franc, Fiume, commerciante.
17. Hellen Giusto, Suak, villa propria.
18. Mikulic Ludmila Fiume maestra scuola fem. Via Clotilde inf.
19. Corosaca Ligenio, Fiume, Via della Salute.
20. Kastel Giuseppe, Fiume, Via del Pino 6.
21. Budak Dinko, Fiume, Farmacia Cati.
22. Catania Antonio, Fiume, Via Clotilde inf. I. III.
23. Prosser Tomaso, Fiume, cap. marit. Ungaro-Croata.
24. Hausner Ignazio prof., Fiume, Ginnasio.
25. Wainshong Dante, Fiume, Via Gualia 3.
26. Suplina Francesco, Fiume, Via Lavatoio 4.
27. Hachthausner Teodoro, Fiume, fabbrica cioc.
28. Lasali Siffredo, Fiume, Via del Pino 6.
29. Sialer Giovanni, Suak, Casa Rustic 9.
30. Miletic Rodolfo, Fiume, Danubius.
31. Fargosa Gior., Fiume, Danubius.
32. Zecchini Cornelio, Fiume, Danubius.
33. Kavka Teodoro, Fiume, Via Operai 12.
34. Rusich Giovanni, Fiume, Cosala 112.
35. Piccoli Giuseppe, Fiume, Danubius.
36. Serdes Romaldo, Fiume, Danubius.
37. Heller Guglielmo, Abbazia.



Boris Di Costanzo
(1944-2021)

Notoj

Selce

45°09'N 14°43'E

1. Hotelo *Esperanto*



Fotis: Josip Pleadin



La Hotelo Esperanto en Selce sur malnova bildkarto.

La rusa-pola kuracisto Grzegorz Sianożęcki (1865-1930), kiu dum la rusa-japana milito servis kiel militkuracisto en rango de regimentestro, estis konvinkita esperantisto, kiu persone konis la aŭtoron de Esperanto, Ludovikon Zamenhof. Post la milito li fondis en Katowice (Pollando) Ginekologian klinikon. En la jaro 1929 li partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto, kaj ekskursante kun la kongresanoj al la adriatika marbordo, li trovis sin en Selce, tiu belega loko, kiu ravis lin. Samjare li tie aĉetis de emerita pastro unuetaĝan domon *Moj mir*, alkonstruis ĝian duan etaĝon kaj nomis ĝin *Vilao Esperanto*, intencante en ĝi malfermi ginekologian sanatorion. Bedaŭrinde, jam sekvontjare, kiam li venis por malfermi la sanatorion, la 10-an de aŭgusto 1930 en Selce surstrate trafis lin aŭtomobilo kaj li mortis. La konstruaĵo poste estis adaptita al moderna pensiono *Esperanto*.

La hotelo nuntempe estas posedata de neesperantista familio Horvat, kaj en ĝi neniu parolas Esperanton. Tamen, ĝi jam pli ol 90 jarojn ne ŝanĝis sian nomon, kaj pluraj traurbaj vojmontriloj direktas turistojn al ĝi.



Notoj

Vrbovec

45°53'N 16°25'E

1. Memortabulo al Josip Velebit



Fotis: Željko Gubijan



*Josip Velebit
(1911 - 2000)*



La memortabulo.

La memortabulo al la konata profesoro de la latina kaj germana lingvoj Josip Velebit (1911-2000) kiu estis ankaŭ tre fama Esperanta poeto kaj tradukisto, staras super la ĉefa enirejo de la Mezlernejo en Vrbovec (Ulica 7. svibnja 2), en kiu li profesoris kaj vivis ekde la jaro 1965 kaj samurbe mortis en 2000.

Kvankam kiel starigdato sur la tabulo estas gravurita la 20-a de junio 2011 honore al la 100-jara naskiĝdatreveno de Josip Velebit, la memortabulo efektive estis malkovrita la 14-an de junio. En la Mezlernejo de Vrbovec samtage okazis omaĝkunveno, dum kiu pri Velebit parolis pluraj liaj konatoj kaj lernantoj.

La memortabulon oficiale starigis Urbo Vrbovec, kaj post la inspira parolado, maklovris ĝin la urbestro de Vrbovec, sinjoro Vladimir Bregović.



La ĉefa enirejo de la Mezlernejo Vrbovec.

Notoj

Zagreb

45°48'N 15°58'E

1. Memortabulo al *Kroata Eperantisto*



Fotis: Radenko Milošević



Vinko Fabris
(1933-2009)



Radenko Milošević
(1943-2016)

Laŭ la atesto de inĝeniero Marin Vrus (1947) el Zagrebo, la ideon pri starigo de la memortabulo al *Kroata Esperantisto* lanĉis Radenko Milošević, nome de Zagreba Esperanto-Ligo. *Kroata Esperantisto* estis la unua Esperanto-gazeto eldonata en la teritorio de Kroatio. Eldonadis ĝin Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj (UKE) en Zagrebo en la jaroj 1909-1911. Detalan kroatlingvan studon pri tiu gazeto verkis prof. Velimir Piškorec en 2006 sub la titolo *Naĝu, naĝu, ŝipo mia – prvi hrvatski esperantski časopis Kroata Esperantisto (1909-1911)*.

Marin Vrus faris skizon de la memortabulo en 1989, laŭ kiu la tabulon formis konata kroata skulptisto Vinko Fabris (1933-2009). La tabulon produktis Muldejo de la Lernejo pri aplikitaj artoj kaj dezajno en Zagrebo, kie Fabris profesoris. Ĝi estas produktita el bronzo kun originala malhela patino.

La tabulo staras sur la domo ĉe Placo de reĝo Tomislav n-ro 21, kie iam troviĝis la redakcejo de la gazeto. Oficiale la tabulon starigis Zagreba Esperanto-Ligo okaze de la 80-a datreveno post la apero de la unua numero.

La memortabulon malkovris Emilija Lapenna, kaj la starigon partoprenis dudeko da zagrebaj esperantistoj. Kvankam sur la memortabulo estas notite, ke ĝi estis starigita la 15-an de decembro 1989, okaze de la Zamenhofa tago, efektive la afero malfruis, kaj la vera makovro estis organizita la 12-an de aprilo 1990.



*Emilija Lapenna
(1910-1994)*

Notoj

Zagreb

45°48'N 15°58'E

2. Zamenhofa strato



Fotis: Josip Pleadin, 2019




Esperantistoj dum la proklamo de Zamenhof-strato en 1953

En 1953 en Zagrebo, sub la alta protekto de Vladimir Bakarić, prezidanto de la Kroatia registaro, okazis la 38-a Universala Kongreso de Esperanto kiel unu el la plej grandaj internaciaj aranĝoj en Jugoslavio. La organizantoj de la kongreso deziris, ke por tiu okazo oni proklamu Zamenhofan straton en Zagrebo. La ideon subtenis la Popola komitato de Urbo Zagrebo ĝia tiam prezidanto (la urbestro de Zagrebo) Većeslav Holjevac, kaj ekde tiam la iama Borošina strato (Borošina ulica), portas la nomon de L. L. Zamenhof.

La oficiala proklamo okazis la 28-an de julio 1953 kun partopreno de multegaj kongresanoj. La solenaĵon malfermis d-ro Ivo Borovečki, la prezidanto de la LKK, kaj transdonis la vorton al s-ro Mirko Pavleković, reprezentanto de la urbestro, kiu fine de sia parolado deprenis la verdan flagon de sur la tabulo kun la teksto *Ulica dr. L. Zamenhofs*. Post li parolis s-ro David Kenedy, estrarano de UEA.

Poste ankaŭ malgranda apuda strateto ricevis la nomon *Zamenhofove stube* (Zamenhofa ŝtuparo).



*Oficiala letero de Većeslav Holjevac
pri proklamo de la Zamenhofa
strato en Zagrebo*




*Ivo Borovečki
(1924 - 2013)*

Notoj

Zagreb

45°48'N 15°58'E

3. Skulptaĵo *La Futuro*



Fotis: Ivan Špoljarec



*La skulptisto
Jesper Neergaard
(1940)*



*Spomenka Štimec
(1949)*

Starigo de la abstrakta skulptaĵo *La futuro* en Zagrebo, efektive ĝemela skulptaĵo al *La espero* de la sama aŭtoro, kiu staras sur *Esperantoplatz* en Graz, prezentis verŝajne la plej grandan kaj la plej komplikan projekton pri iu ajn ZEO en Kroatio. Detale pri ĝi oni povas legi kroatlingve en la libro *Esperantski mozaik* (Osijek, 2003, paĝoj 240-242) en la teksto *Esperantski spomenik od kararskog mramora* de Spomenka Štimec, kiu iniciatis kaj gvidis la tutan projekton.

Renkonte al la okazigo de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Zagrebo inter la 21-a kaj 28-a de julio 2001, aperis ankaŭ la ideo ebligi longtempan memoron pri tiu evento per valora monumento. La aŭtoro de la skulptaĵo, la dana skulptisto Jesper Neergaard, filo de la konata esperantisto Paul Neergaard, je la demando de kroataj esperantistoj promesis senpage fari la skulptaĵon, kondiĉe ke esperantistoj kovru la koston de la marmoro kaj aliajn transport- kaj starigo-kostojn.

Neergaard skulptis la monumenton en 2001 en sia somera ateliero en Carrara (Italio), el kies fama ŝtonminejo devenas ankaŭ la marmoro. Por la kostoj kontribuis diversaj enlandaj kaj eksterlandaj institucioj kaj unuopuloj.

La skulptaĵon oni decidi starigi en la parko antaŭ la Ekonomia fakultato de Zagrebo sur Placo de Kennedy.

Dum la inaŭgura solenaĵo, okazinta la 21-an de julio 2001, kiun partoprenis amaso da kongresanoj de la 86-a UK, parolis la nobelpremiito Reinhardt Selten, Ludoviko C. Zaleski-Zamenhof (la nepo de la aŭtoro de Esperanto) kaj la urbestro Milan Bandić, kiu malkovris la skulptaĵon.

Sur la granita postamento estas ĉizita la teksto: *Esperanto – por monda komunikado en paco kaj libero, 2001.*

Notoj

Zagreb

45°48'N 15°58'E

4. La maketo Zagrebo salutas



Fotis: Josip Pleadin, 2020



En la kruciĝejo de la zagrebaj stratoj de August Cesarec kaj Tomo Bakač, ĉe la transiro el la Placo de Banuso Jelačić al la urboparto Kaptol, situas granda bronza maketo nomata *Zagreb pozdravlja* (Zagrebo salutas). Ĝiaj dimensioj estas 3,65 x 3,55 metrojn, kaj ĝi prezentas la spacon de 2,64 kvadratkilometroj. Sur la maketo estas prezentitaj entute 2.515 domoj, 153 domblokoj, 19 placoj kaj 421 aliaj objektoj, kiuj prezentas la plej gravajn historiajn kaj turismajn vidindaĵojn de la urbocentro de Zagrebo.

En ĝiaj norda kaj okcidenta anguloj estas ĉizita mallonga prihistoria teksto en la kroata kaj angla, kaj en la maldekstra parto de la maketo troviĝas stelo kun turniĝanta globo en la mezo, sur kiu estas ĉizitaj bonvenigaj vortoj en 38 lingvoj, interalie la Esperanta vorto *Bonvenon*.

La ideo pri tiu maketo estis lanĉita en 2011, kaj la artaĵo estis inaŭgurita la 20-an de junio 2013. La aŭtoro de la maketo estas akademia pentristo prof. Damir Mataušić, konata ankaŭ kiel aŭtoro de la 25-kunaa monero kun Esperanta teksto. La maketon produktis la Muldejo de la Akademio de plastikaj artoj en Zagrebo kaj proponintoj de la projekto estis la zagreba Turisma asocio kaj Urbo Zagrebo.

Notoj

Zaprešić

45°51'N 15°48'E

1. Memortabulo al Josip Velebit



Fotoj: Matica hrvatska Zaprešić



Starigon de memortabulo al profesoro kaj esperantisto Josip Velebit en Zaprešić iniciatis la Filio de *Matica hrvatska* kaj ĝia prezidanto Stjepan Laljak. La starigon de la memortabulo akompanis ronda tablo pri profesoro Velebit, organizita de *Matica hrvatska* kunlabore kun Elementa lernejo *Antun Augustinčić* kaj aŭspiciita de la Departemento Zagreb kaj Urbo Zaprešić.

La ronda tablo kaj starigo de la memortabulo okazis la 4-an de oktobro 2011. La tabulo staras sur la Metiista domo (*Dom obrtnika*) en la strato de Marŝalo Tito n-ro 2, sur la konstruaĵo en kiu en la jaroj 1956-1961 vivis profesoro Velebit. La tabulon malkovris la zagreba departementestro Stjepan Kožić.

La marmoran tabulon ĉizis akademia skulptisto Dragutin Grgas, iama lernanto de profesoro Velebit.

Samokaze ĉe *Matica hrvatska Zaprešić* aperis speciala broŝuro de Stjepan Laljak kun la rezultoj de lia esplorado pri Josip Velebit, en kiu troviĝas multaj ĝis tiam nekonitaj detaloj.

Notoj

Kroatio

1. Monero de 25 kunaoj



*Averso kaj reverso de la
25-kunaa monero.*



*Damir Mataušić
(1954)*



*Dalibor Brozović
(1927 - 2009)*

Fotoj el la arkivo de Dokumenta Esperanto-Centro.

En 1997, okaze de la Unua kongreso de kroataj esperantistoj (aranĝita la 31-an de majo kaj 1-an de junio en Zagrebo), Kroata nacia banko (Hrvatska narodna banka) eldonis specialan porokazan moneron de 25 kunaoj kun dulingva (kroata kaj Esperante) tekstoj. Temas pri monero, kiu ekde la 24-a de junio 1997 ĝis nun estas valida cirkulanta mono.

La monero havas diametron de 32 milimetroj, formon de 12-pinta poligono kaj pezon de 12,75 gramoj. Estis eldonitaj entute 300.000 ekzempleroj, kaj la ĉefan meriton por ĝia eldono havas la membro de Kroata akademio de sciencoj kaj artoj Dalibor Brozović (1927-2009), konata kroata lingvisto, tiuperioda politikisto (vicprezidanto de Kroatio en 1990) kaj direktoro de Kroata leksikografia instituto (ĝis 1991). Brozović estis esperantisto ekde 1946, fama interlingvisto kaj esperantologo, ekde 1992 prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo (kiu organizis la unuan kongreso de kroataj esperantistoj), membro de Honora patrona komitato de UEA, prezidanto de la LKK de la 86-a UK en Zagrebo ktp. Samtempe kun la monero, li entreprenis kaj realigis la eldonon de kroataj Esperantaj poŝtmarkoj: la unua en 1997, okaze de la Unua kongreso de kroataj esperantistoj, kaj la dua en 2001, okaze de la 86-a Universala Kongreso de Esperanto).

La centra parto de la 25-kunaa monero estas produktita el alojo, konsistanta el 92% da kupro, 6% da aluminio kaj 2% da nikelo, dum la ekstera ringo konsistas el 75% da kupro kaj 25% da nikelo. Ĝi estas produktita en la kroata monfarejo (Hrvatski novčarski zavod; <http://www.hnz.hr/>) en Zagrebo, en kies retejo troviĝas malonga priskribo de la monero, same kiel en la retejo de Kroata nacia banko: <https://www.hnb.hr/-/25-kuna-prvi-kongres-hrvatskih-esperantista>.

Aŭtoro de la monero estas la renoma kroata akademia skulptisto kaj medalisto Damir Mataušić (1954) el Zagrebo (www.matausic.net).

Kvankam la 25-kunaa monero estas oficiala cirkulanta mono de Kroatio, en la cirkulado ĝi malofte aperas, ĉar krom sia ĝenerala valoro, ĝi havas multe pli grandan numismatikan valoron. Jam delonge ne eblas havigi ĝin krom en aŭkcioj, kie ĝi atingas multe pli altan prezon ol estas ĝia reala valoro.

La eldonon de la monero difinis la Konsilantaro de Nacia banko de Kroatio per la Decido pri bazaj karakterizaĵoj de la porokaza cirkulanta monero de 25 kunaoj “Unua kongreso de kroataj esperantistoj” (kroatlinge: Odluka o osnovnim obilježjima prigodnog

optjecajnog novca od 25 kuna “Prvi kongres hrvatskih esperantista”), aperinta en Narodne novine, la oficiala gazeto de Respubliko Kroatio, numero 58 de la 9-a de junio 1997, kaj per la posta Decido pri cirkuligo, aperinta en la numero 60 de la 11-a de junio 1997. Tiujn decidojn subskribis la tiama Prezidanto de la Konsilantaro de Nacia banko de Kroatio, d-ro Marko Škreb.

Notoj

Aldona listo

La celo de la aldona listo estas prezenti ankaŭ tiujn ZEO-jn kiuj ne plu ekzistas aŭ ne estas ligitaj rekte al Zamenhof aŭ Esperanto, sed al kelkaj konataj esperantistoj.

1. DUGI RAT: Esperanto-tabulo starigita de Davor Grgat

La tabulon ĉirkaŭ 1970 muntis konata Esperanto-ĵurnalisto Davor Grgat (1935-2018) sur la bushaltejo en Mali Rat, 16 km for de Split, apud la Adriatika magistralo. Ĝia grandeco estis 130 x 30 cm.




Fotis: Davor Grgat

2. KORĈULA: Strato de Marinko Gjivoje

En Korĉula sur la samnoma adriatika insulo ekzistas Strato de Marinko Gjivoje (1919-1982), konata kroata Esperanto-historiisto kaj ĵurnalisto.

3. LOPUD: *Tombo de Milunka Ramljak*

La tombon de sia edzino Milunka Ramljak (1910-1966) priskribis advokato kaj esperantisto Ante Ramljak. Sur ĝi, sur du apartaj ŝtonplatoj, estis ĉizitaj Esperantaj tekstoj: *Insulo Lopud, mia amo kaj sorto, ripozo mia, ankaŭ post la morto. / Al sia edzino la monumenton konstruis kaj ornamis per ŝtonoj plantoj kaj vortoj D-ro Ante Ramljak.* Ne estas konfirmite, ke tiu tombo ankoraŭ ekzistas, sed iama foto konfirmas ke ĝi ekzistis.



4. NAŠICE: *Strato de Mavro Špicer*

Per la decido de la Urba konsilantaro de Urbo Našice, la Strato de Mavro Špicer estis proklamita la 13-an de decembro 2002. Mavro Špicer (1862-1936) estis pioniro de Esperanto en Kroatio, kiu kunfondis Unuiĝon de kroataj esperantistoj en Zagrebo en 1908, kiel la unuan landnivelan Esperanto-organizaĵon.

5. OSIJEK: *Esperanto-parko kaj Esperanto-arbo*

Ne plu ekzistantaj ZEO-j, kiuj eĉ dum sia mallonga ekzisto neniam estis oficiale rekonitaj de urbaj instancoj.



*Mavro Špicer
(1862-1936)*



Esperanto-parko en Osijek.

6. PRIMOŠTEN: *Esperanto-kampadejo*

Ne plu funkcianta kampadejo, kiu tamen ekde 1961 dum preskaŭ kvaronjarcento intense funkciis.



7. SLAVONSKI BROD: *Esperanto-strato*

Ne plu ekzistanta strato. Ĝi estis proklamita en 1961, kaj ĝia nomo estis ŝanĝita en 1992.

8. SPLIT: *Pola ŝipo Zamenhof*

La pola transoceana ŝipo *Zamenhof* estis konstruita en la Ŝipfarejo de Split en la jaro 1959. La ideon lanĉis pola esperantisto Erasm Nawrowski el Gdynia jam en 1957, renkonte al la Zamenhofa jaro kaj Universala Kongreso de Esperanto okazonta en 1959 en Varsovio. Post multaj klopodoj la pola Ministerio pri Navigado decidis, ke unu ŝipo, konstruata en Jugoslavio por *Polskie Linie Oceaniczne*, anstataŭ ricevi la nomon *Moniuszko* kiel planite, ricevu la nomon *Zamenhof*. La ŝipo *Zamenhof* estis enmarigita la 12-an de julio 1959 kaj ĝin baptis Helena Grochulska, la edzino de pola ambasadoro en Beogrado Henryk Grochulski. Kiel esperantistoj la solenaĵon partoprenis Aleksa Hrستیć



kiel delegito de UEA kaj Josip Velebit nome de Jugoslavia Esperanto-Federacio. Kapitano de la ŝipo estis Stanisław Jaworski. La trampo *Zamenhof* estis 154 metrojn longa, 18,80 metrojn larĝa, 12 metrojn alta, ĝi posedis 12.800 tunojn kaj motoron *Fiat* de 6000 ĉevalpovoj, plenŝarĝita ĝi disvolvis la rapidecon de 15 marmejloj pohore. Ĉi tiu ŝipo estis la dua en la serio de sep samtipaj ŝipoj, kiujn la ŝipfarejo Split konstruis por Pollando. Ĝi estis malkonstruita en 1980.

9. VARAŽDIN: *Strato de Božidar Vančik*

La Strato de Božidar Vančik (1909-1970), tre konata juristo kaj Esperanto-poeto kaj tradukisto, ekzistas en Varaždin.



Fotis: Stanko Rukelj

10. ZAGREB: *Strato de Slavko Ježić*

En Zagrebo ekzistas la Strato de Slavko Ježić (1895-1969), malnova esperantisto, kaj verkinto de la unua publikigita poemo en Esperanto en Kroatio.



Slavko Ježić
(1895-1969)

Statistiko

En Kroatio fine de januaro 2022 ekzistas 22 ZEOj en 15 urboj: Zagrebo (4+1), Bjelovar (2), Đurđevac (2) Hrašćina (1), Koprivnički Bregi (1), Kostrena (1), Križevci (1), Lopud (1), Opatija (1), Osijek (1), Primošten (1), Rijeka (1), Selce (1), Vrbovec (1), Zaprešić (1) kaj unu tutkroatia.

Temas pri: arbo (1), memortabulo (6), strato (2), ŝtuparo (1), domo (1), tomba memortabulo (3), informtabulo (1), hostelo (1), barilo (1), mueleja ŝtono (1), hotelo (1), monero (1), skulptaĵo (1), maketo (1).

Plej multaj estas memortabuloj (6), tombaj memortabuloj (3) kaj stratoj (2).

Laŭ la jaroj de starigo/proklamo, la listo aspektas jene: 1 estis proklamita en 1930, 1 en 1953, 1 en 1964, 1 en 1968, 1 en 1973, 1 en 1980, 2 en 1989, 1 en 1997, 1 en 2001, 1 en 2007, 3 en 2009, 2 en 2011, 1 en 2012, 1 en 2013, 1 en 2018, 2 en 2019 kaj 1 en nekonata jaro. La plej malnova devenas el 1930 (Hotelo *Esperanto* en Selce) kaj la plej novaj el 2019 (memortabulo al Vilim Polašek en Bjelovar kaj Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac). Plej multaj (3) estis proklamitaj en 2009.

**Ĉi tiun eldonon kunfinancis
Urbo Bjelovar**



Ovo izdanje izrađeno je uz financijsku podršku
Grada Bjelovara.
Sadržaj ovog izdanja u isključivoj je odgovornosti
Društva esperantista Bjelovara
i ni pod kojim uvjetima se ne može smatrati
kao odraz stajališta Grada Bjelovara.